

KIE ESTAS AMO, TIE ESTAS DIO
Rakonto de Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910).
El rusa lingvo tradukis en la jaro 1912 N. Kabanov.

En unu urbo loĝis botisto Martino Avdeič. Li loĝis en subtera etaĝo, en ĉambreto kun sola fenestro. La fenestro estis en strata muro. Tra la fenestro estis vidate, kiel pasis homoj. Kvankam nur piedoj estis vidataj, sed Martino Avdeič ekkonadis homojn laŭ botoj. Martino Avdeič loĝis delonge sur unu loko kaj havis grandan konatularon. Malofta paro da botoj en ĉirkaŭaĵo ne estis en liaj manoj unu aŭ du fojojn. Al iaj botoj li faris alplandojn, al iaj – flikojn, ian fojon li eĉ renovigis antaŭan parton de botoj. Kaj ofte li vidis tra fenestro sian laboron. Avdeič havis multon da laboro, ĉar li laboradis solide, uzadis bonan materialon, prenadis nekaran prezon por laboro kaj plenumadis vorton. Se li povas fari ĝis difinita limtempo, li prenas laboron, se ne, li ne provas trompi, sciigas antaŭe. Kaj ĉiuj konis Avdeič'on, kaj laboro ne ĉesadis ĉe li. Avdeič ĉiam estis bona homo, sed maljuniĝinte li komencis pli mediti pri sia animo, pli proksimiĝi al Dio. Antaŭe, kiam Martino vivis ĉe majstro, lia edzino mortis. Kaj post la edzino restis sola knabo, trijara. Infanoj ne vivis ĉe ili. Pliaĝaj ĉiuj mortis antaŭe. Komence Martino volis fordoni filĉjon al sia fratino vilaĝon, sed poste li ekkompatis lin, pensis: „Malfacile estos al mia Kapitoĉjo kreski en fremda familio, restigu mi lin ĉe mi”. Kaj Avdeič forlasis la majstron kaj ekloĝis kun la filĉjo en aparta loĝejo. Sed Dio ne donis al Avdeič feliĉon rilate al infanoj. Apenaŭ la knabo elkreskis, komencis helpi al la patro, malsano atakis Kapitoĉjon, la knabo malsaniĝis, febris unu semajnon kaj mortis. Martino enterigis la filon kaj ekmalĝojis. Tiel li ekmalĝojis, ke li komencis plendi kontraŭ Dio. Tiel Martino ekenuis, ke ne unu fojon li petis de Dio mor-

ton kaj riproĉis Dion pri tio, ke li igis morti ne lin, maljunulon, sed la amatan solan filon. Avdeič eĉ ĉesis viziti preĝejon. Kaj jen unu fojon maljunulo samvilaĝano preterpasante venis al Avdeič, li pilgrimis jam okan jaron. Avdeič interparolis kun li kaj komencis plendi al li pri sia malfeliĉo.

“Kaj nenia deziro estas,” li diras, “plu vivi, Dia homo! Se mi mortus! Nur pri tio mi petas Dion. Mi estas nun senespera homo.”

Kaj diris al li la maljunulo:

“Ne bone vi parolas, Martino, ni ne devas juĝi pri diaj aferoj. Ne per nia saĝo, sed per dia juĝo. Dio aljuĝis al via filo morti kaj al vi vivi. Sekve, tiel estas pli bone. Kaj se vi malesperas, ĝi estas pro tio, ke vi deziras vivi por via ĝojo.”

“Sed por kio necesas vivi?” demandis Martino. Kaj la maljunulo diris:

“Por Dio, Martino, necesas vivi. Li donas vivon al vi, sekve por Li vi devas vivi. Ĝiam vi komencos vivi por Li, tiam vi malĝojos pri nenio, kaj ĉio montriĝos al vi facila.”

Martino iom silentis kaj diras:

“Sed kiel necesas vivi por Dio?”

Kaj diris la maljunulo:

“Kiel vivi por Dio, tion Kristo montris al ni. Ĉu vi scias legi? Aĉetu Evangelion kaj legu, tie vi ekscios, kiel necesas vivi por Dio. Tie ĉio estas montrita.”

Kaj falis ĉi tiuj vortoj en la koron de Avdeič. Kaj li ekiris la saman tagon, aĉetis al si Evangelion kaj komencis legi.

Avdeič intencis legi nur dum festoj, sed kiam li komencis legi, tiel bone fariĝis al li en la animo, ke li komencis legi ĉiutage. Ian fojon li legas tiel longe, ke eĉ tuta petrolo elbrulas en lampo, kaj li ĉiam ne povas sin deturni de la libro. Kaj Avdeič komencis tiel

legi ĉiun vesperon. Kaj ju pli li legis, des pli klare li komprenis, kion Dio volas de li kaj kiel necesas vivi por Dio; kaj fariĝis al li ĉiam pli facile en la koro. Antaŭe okazadis, li kuŝiĝas dormi, ĝemetas kaj ĉiam rememoras Kapitoĉjon, sed nun li nur paroladas: „Gloro al vi, gloro al vi, Sinjoro! Via volo”. Kaj de tia tempo tuta vivo de Avdeič ŝanĝiĝis. Okazadis antaŭe, festan tagon li vizitis restoracion por trinki teon kaj iafoje li ne rifuzis trinki brandon. Okazadis, li trinkas kun konatulo, kaj kvankam li ne estas malsobra, sed tamen li eliras el la restoracio malsobrete gaja kaj parolas malseriozaĵon: jen li maldelikate ekkrias al iu, jen li ĉikanas pri iu. Nun ĉio tio ĉi forigis mem de li. La vivo fariĝis kvieta kaj ĝoja. Matene li sidiĝas por labori, laboras ian tempon, poste li demetas de hoketo lampon, metas sur la tablon, prenas de breto la libron kaj sidiĝas por legi. Kaj ju pli li legas, des pli li komprenas, kaj ĉiam pli serene kaj pli gaje fariĝas al li en la koro.

Okazis unu fojon, Martino legis tre malfrue vespere. Li legis Evangelion de Luko. Li legis sesan ĉapitron, legis jenon: „Se iu frapis vin je unu vango, proponu alian; se iu forprenas de vi supran vestaĵon, ne malhelpu forpreni ankaŭ ĉemizon. Donu al ĉiu petanta de vi, ne postulu reen de ĉiu preninta ĉe vi. Kaj kiel vi deziras, ke homoj agu rilate al vi, tiel ankaŭ vi agu rilate al ili”.

Li legis pluen, kie Sinjoro diras:

„Pro kio vi vokas min: Sinjoro! Sinjoro! kaj ne faras tion, kion mi diras? Kaj mi diros al vi, al kiu simila estas ĉiu venanta al mi, aŭskultanta miajn vortojn kaj plenumanta ilin: li estas simila al homo, kiu konstruas domon, kiu profunde fosis kaj starigis fundamenton sur ŝtona grundo; pro tio kiam okazis superakvego, kaj akvo surpremis ĉi tiun domon, ĝi ne povis ŝanceli domon, ĉar ĝi estis konstruita sur ŝtona grundo. Sed aŭskultanta kaj ne plenumanta estas simila

al homo, kiu konstruis domon sur tero sen fundamento, kaj la domo, kiam akvo surpremis ĝin, tuj ruiniĝis; kaj la ruiniĝo de tiu ĉi domo estis granda”.

Avdeič legis ĉi tiujn vortojn, kaj ĝoje fariĝis al li en la animo. Li demetis okulvitrojn, lasis la libron, sin apogis per kubutoj sur la tablon kaj enpenisiĝis. Kaj li komencis apliki sian vivon al tiuj ĉi vortoj. Kaj li pensas:

„Nu kiel estas mia domo, ĉu ĝi estas sur ŝtono aŭ sur sablo? Bone estas, se ĝi estas sur ŝtono. Kaj tiel facile mi sidas sola: ŝajnas, ĉion mi faris, kiel Dio ordonas; sed se mi distriĝas, mi denove pekas. Tamen mi penos. Ja estas tiel bone! Dio, helpu min!”

Li meditis tiel, volis kuŝiĝi, sed estis domaĝe sin deturni de la libro. Kaj li komencis legi sepan ĉapitron. Li legis pri centestro, legis pri la filo de la vidvino, legis pri la respondo al disĉiploj de Johano kaj ĝislegis al tiu loko, kie la riĉa fariseo invitis Sinjoron al si, kaj li legis pri tio, kiel la virino – pekulino ŝmiris per oleo liajn piedojn, lavis ilin per larmoj kaj kiel li pravigis ŝin. Kaj li daŭrigis legi:

„Kaj, sin turninte al la virino, li diris al Simono: ĉu vi vidas tiun ĉi virinon. Mi venis vian domon, kaj vi ne donis akvon al mi por piedoj; sed ŝi surverŝis per larmoj miajn piedojn kaj viŝis ilin per haroj de sia kapo. Vi ne donis al mi kison, sed ŝi, de tiu tempo, kiam mi venis, ne ĉesas kisi miajn piedojn. Vi ne ŝmiris per oleo mian kapon, ŝi ŝmiris miajn piedojn”. Li legis tion ĉi kaj meditas:

„Ne donis akvon por la piedoj, ne donis kison, ne ŝmiris la kapon per oleo”...

Kaj Avdeič denove demetis la okulvitrojn, lasis la libron kaj denove enpenisiĝis.

“Fariseo, videble, estis tia sama, kiel mi. Ŝajnas, li memoris nur pri si mem. Li zorgis nur pri tio, ke li trinku teon, ke li estu en varmo, en bonstato, sed li ne pensis pri la gasto. Li memoris pri si mem, sed tute ne

zorgis pri la gasto. Kaj kiu estis la gasto? Sinjoro mem. He, se li venus al mi, mi, certe, ne farus tiel.

Kaj Avdeiĉ sin apogis sur ambaŭ kubutoj kaj ne rimarkis, kiel li dormetiĝis.

“Martino!” subite io ekspiris super lia orelo. Martino ekmaldormiĝis.

“Kiu estas tie?”

Li sin turnis, ekrigardis la pordon, neniuj estas. Li denove dormetiĝis. Jen subite li klare aŭdas:

“Martino, he, Martino! rigardu morgaŭ sur la straton, mi venos”.

Martino rekonsciiĝis, sin levis de seĝo; komencis froti la okulojn. Kaj li mem ne scias, ĉu li aŭdis tiujn ĉi vortojn en songo aŭ maldorme. Li estingis la lampon kaj kuŝiĝis dormi.

Matene, ankoraŭ antaŭ tagiĝo Avdeiĉ sin levis, preĝis al Dio, hejtis fornon, metis sur fornon brasikan supon, kaĉon, preparis samovaron, surmetis antaŭtukon, sidiĝis apud la fenestro por labori. Avdeiĉ sidas, laboras kaj mem ĉiam pensas pri hieraŭa. Kaj li pensas dumaniere: jen li opinias, ke ĝi ŝajnis; jen li opinias, ke li vere aŭdis voĉon. Nu, li pensas, ja ĝi okazadis.

Martino sidas apud la fenestro kaj ne tiom laboras, kiom rigardas tra la fenestro; kaj kiam iu pasas en nekonataj botoj, li kliniĝas, enrigardas tra la fenestro por ekvidi ne nur piedojn, sed ankaŭ vizaĝon. Kortisto pasis en novaj feltŝuoj, akvoportisto pasis, poste maljuna soldato en malnovaj feltŝuoj, kun ŝovelilo en manoj. Avdeiĉ ekkonis lin laŭ feltŝuoj. Lia nomo estis Stepanoviĉ, kaj li loĝis ĉe najbara komercisto pro favoro. Li helpadis kortiston. Stepanoviĉ komencis deŝoveli neĝon, kontraŭ la fenestro. Avdeiĉ ekrigardis lin denove, komencis labori.

Videble, mi fariĝis tute malsaĝa pro maljuneco, ekmokis Avdeiĉ sin mem. “Stepanoviĉ deŝovelas neĝon, kaj mi opinias – Kristo iras al mi. Mi tute malsaĝiĝis,

maljunulaĉo.”

Tamen Avdeiĉ baldaŭ denove komencis rigardagi tra la fenestro. Kaj jen li vidas: Stepanoviĉ apogis la ŝovelilon al muro kaj mem ĉu li varmiĝas, ĉu li ripozas.

„Li estas homo maljuna, malsanema; videble, li eĉ ne havas fortojn por ŝoveli neĝon,” pensis Avdeiĉ. “Trinkigu mi lin per teo, ja ankaŭ la samovaro ekboliĝis”.

Avdeiĉ sin levis, metis la samovaron sur la tablon, ekinfuzis teon kaj frapis per fingro je vitro. Stepanoviĉ sin turnis kaj aliris al la fenestro. Avdeiĉ logis lin kaj ekiris malfermi la pordon.

“Eniru, varmiĝu,” li diris. “Ja vi malvarmiĝis.”

“Kristo savu vin; vere ostoj doloras,” diris Stepanoviĉ.

Stepanoviĉ eniris, forskuis de si neĝon, komencis viŝi piedojn, por ne restigi malpurajn postsignojn sur planko, kaj mem li ŝanceliĝas.

“Ne penu viŝi. Mi viŝos plankon; iru, sidiĝu,” diris Avdeiĉ. “Jen, trinku teon.!”

Kaj Avdeiĉ verŝis teon en du glasojn, alŝovis unu glason al la gasto kaj mem elverŝis teon el sia glaso en subtason kaj komencis blovi.

Stepanoviĉ eltrinkis sian glason, renversis ĝin, metis sur ĝin restaĵon de sukero *) kaj komencis danki. Kaj videble, ke li deziras ankoraŭ.

**) Rusa kutimo por montri, ke oni ne plu deziras trinki.*

“Trinku ankoraŭ,” diris Avdeiĉ kaj verŝis ankoraŭ po unu glaso al si kaj al la gasto.

Avdeiĉ trinkas sian teon kaj mem de tempo al tempo rigardas straton.

“Ĉu vi atendas iun?” demandis la gasto.

“Ĉu mi atendas? eĉ mi hontas diri, kiun mi atendas. Ĉu mi atendas, ĉu ne, sed unu vorto falis al mi en la koron. Ĉu ĝi estis

fantomo, ĉu tiel, mi mem ne scias. Jen kio, mia fratulo; mi legis hieraŭ Evangelion pri Kristo, kiel li suferis, kiel li iradis sur tero. Ĉu vi aŭdis pri tio?”

“Jes, mi aŭdis,” respondis Stepanoviĉ, “sed mi estas homo malklera, ne scias legi.”

“Nu jen, mi legis pri tio sama, kiel li iradis sur tero; jen mi legas, kiel li venis al la fariseo, sed tiu ne faris al Li renkonton. Nu jen, mi legis, fratulo, pri tio sama, kaj pensis: kiel mi akceptus Kriston kun honoro. Se okazus, ekzemple, al mi, mi pensas, mi akceptus lin tiel bonege. Kaj li eĉ ne faris akcepton. Jen mi pensis tiel kaj ekdormetiĝis. Nu, mi ekdormetiĝis, mia fratulo, kaj aŭdas. Iu vokas min laŭnome; mi min levis: voĉo, kvazaŭ iu murmuretas: atendu, li diras, mi venos morgaŭ! Jes, dufoje! Nu jen, ĉu vi kredas, ĝi falis en kapon, mi insultas min mem, tamen mi atendas lin, Kriston.”

Stepanoviĉ balancis kapon kaj diris nenion; li eltrinkis teon, metis glason flanken, sed Avdeiĉ denove starigis glason kaj verŝis ankoraŭ.

“Trinku por sano. Ja mi ankaŭ pensas, kiam Li iradis sur tero, Li malŝatis neniun, amikis pleje kun simpla popolo. Li vizitis ĉiam simplajn homojn kaj elektis disĉiplojn pleje el tiaj samaj, kiel ni, pekuloj, el laboristoj: kiu altigas sin, li diras, tiu estos malaltigita, sed kiu malaltigas sin, tiu estos altigita. Vi, nomas min, Li diras, Sinjoro, kaj mi – lavos viajn piedojn. Kiu volas, Li diras, esti unua, estu servanto por ĉiuj. Ĉar, li diras, feliĉegaj estas mizeruloj, humiluloj; kvietuloj, kompatemuloj.”

Stepanoviĉ forgesis sian teon; li estis homo maljuna, larmema. Li sidas, aŭskultas kaj larmoj fluas sur la vizaĝo.

“Nu, trinku ankoraŭ,” diris Avdeiĉ.

Sed Stepanoviĉ faris krucan signon, dankis, deŝovis la glason kaj sin levis.

“Mi dankas vin,” li diras, “Martino

Avdeiĉ, vi gastigis min, vi satigis animon kaj korpon.

“Mi petas, vizitu alian fojon, mi ĝojos je gasto,” diris Avdeiĉ.

Stepanoviĉ foriris, kaj Martino elverŝis restintan teon, eltrinkis, ordigis tablon kaj denove sidiĝis apud la fenestro por labori. Li laboras kaj mem ĉiam rigardadas tra la fenestro, atendas Kriston kaj ĉiam pensas pri Li kaj pri liaj aferoj. Kaj en lia kapo ĉiam estas diversaj Kristaj paroladoj.

Du soldatoj preterpasis, unu en regnaj botoj, alia en siaj; poste pasis mastro de najbara domo, en purigitaj galoŝoj, poste panisto kun korbo. Ĉiuj pasis pretere; kaj jen iras apud la fenestro virino en lanaj ŝtrumpoj kaj en vilaĝaj ŝuoj. Ŝi pasis preter la fenestro kaj haltis apud interfenestraĵo. Avdeiĉ kliniĝis, ekrigardis ŝin, vidas: fremda virino, malbone vestita kaj kun infano stariĝis apud muro dorse al vento kaj envolvas infanon, sed estas nenio, en kio involvi. Vestaĵo de la virino estas somera kaj malbona. Kaj Avdeiĉ aŭdas: la infano krias, kaj ŝi admonas ĝin kaj neniel povas trankviligi. Avdeiĉ sin levis, eliris tra pordo ŝtuparon kaj vokis:

“Saĝulino! he, saĝulino!”

La virino aŭdis kaj sin turnis.

“Por kio vi staras tie kun infaneto, en malvarmo? Eniru ĉambron, en varmo vi ordigos ĝin plibone. Jen ĉi tien.”

La virino miris. Ŝi vidas, maljunulo, kun antaŭtuko, kun okulvitroj sur la nazo, vokas ŝin al si. Ŝi ekiris post li.

Ŝi malsupreniĝis laŭ ŝtuparo; ili eniris ĉambron; la maljunulo alkondukis la virinon al lito.

“Tien ĉi,” li diras, “sidiĝu, saĝulino, pli proksime al la forno, vi varmiĝos kaj mamnutros infanon.”

“Lakto malestas en la mamoj, mi mem ne manĝis de la mateno,” diris la virino, tamen ŝi almetis infanon al la mamo.

Avdeiĉ balancis kapon, ekiris al la tab-

lo, elmetis panon, supujon, formetis fornan ŝirmilon, verŝis en supujon brasikan supon, elmetis poton kun kaĉo, sed ĝi ne estis ankoraŭ preta; li verŝis sole supon kaj metis sur la tablon. Li elmetis panon, viŝtukon kaj metis ankaŭ sur la tablon.

“Sidiĝu,” li diras, “manĝu, saĝulino, kaj mi mem zorgos pri la infano; ja mi havis mem infanojn, mi scias varti ilin.”

La virino faris krucan signon, sidiĝis apud la tablo kaj komencis manĝi, kaj Avdeič alsidiĝis al la infano sur la liton. Avdeič ŝmacis, ŝmacis al ĝi per la lipoj, sed malbone ŝmaciĝas, dentoj malestas. La infaneto ĉiam krias. Kaj elpensis Avdeič timigi lin per fingro: li eksvingas, eksvingas fingron rekte al ĝia buŝo kaj poste forigas fingron. Li ne donas ĝin en buŝon, ĉar la fingro estas nigra, malpurigita en peĉo. La infaneto komencis rigardi la fingron, trankviliĝis kaj poste eĉ komencis ridi. Avdeič ankaŭ ĝojiĝis. Kaj la virino manĝas kaj mem rakontas, kiu ŝi estas kaj kien ŝi iris.

“Mi estas,” ŝi diras,” soldatedzino; “antaŭ ok monatoj oni forsendis edzon malproksimen, kaj neniam sciigoj estas pri li. Mi servis kiel kuiristino, naskis. Oni forpelis min pro la infano. Kaj jen trian monaton mi estas sen laboro. Mi ĉion elspezis. Mi volis servi kiel nutristino, oni ne prenas: mi estas malgrasa, oni diras. Jen mi vizitis komercist-edzinon, tie nia samvilaĝanino vivas; la komercistedzino promesis preni min. Mi opiniis, ke ŝi tuj prenos min. Sed ŝi ordonis veni estontan semajnon, tamen ŝi loĝas malproksime. Mi tute lacegiĝis kaj lacigis ĝin, karulon. Bone estas, ke loĝeja mastrino kompatas nin, permesas loĝi pro Kristo. Alie mi ne scius, kiel vivi.”

Avdeič ekspiris kaj diras:

“Ĉu vi havas varman vestaĵon aŭ ne?”

“Nu, kia varma vestaĵo, karulo! Hieraaŭ mi prodonis lastan tukon por dudek kopekoj.”

La virino aliris al la lito kaj prenis la infanon, kaj Avdeič sin levis, ekiris al muro, serĉis kaj alportis malnovan supran veston.

“Jen,” li diras,” kvankam ĝi estas malbona aĵo, tamen ĝi taŭgos por involvi infanon.”

La virino rigardis la veston, rigardis la maljunulon, prenis la veston kaj ekploris. Avdeič sin deturnis, subiĝis sub la liton, elmetis kesteton, serĉis en ĝi kaj denove sidiĝis kontraŭ la virino.

Kaj diris la virino:

“Kristo savu vin, aveto; videble, Li sendis min apud vian fenestron. Mi frostigus infaneton. Mi eliris, estis varme, sed nur jen kiel fariĝis malvarme. Ja Li igis vin rigardi tra la fenestro kaj kompati min, malfeliĉan.”

Avdeič ekridetis kaj diras.

“Vere Li igis. Tra la fenestro mi rigardas, saĝulino, ne vane.”

Kaj Martino rakontis ankaŭ al la soldatedzino sian sonĝon kaj kiel li aŭdis voĉon, ke Sinjoro promesis hodiaŭan tagon veni al li.

“Ĉio povas esti,” diris la virino, sin levis, surĵetis sur la ŝultrojn la malnovan supveston, involvis en ĝin la infanon kaj komencis adiaŭi, komencis denove danki Avdeič’on.

“Prenu pro Kristo,” diris Avdeič kaj donis al ŝi dudek kopekojn, por elaĉeti la tukon.

La virino faris krucan signon, Avdeič ankaŭ faris krucan signon kaj akompanis la virinon.

La virino foriris; Avdeič manĝis supon, ordigis la tablon kaj denove sidiĝis por labori. Li mem laboras kaj ankaŭ memoras pri la fenestro: se mallumiĝas en la fenestro, li tuj ekrigardas, kiu pasis. Pasis konatuloj, pasis fremduloj, sed neniu estis atentiga.

Kaj jen Avdeič vidas: kontraŭ la fenestro mem haltis maljunulino, komercistino. Ŝi

portas korbon kun pomoj. Malmulto da pomoj jam restis: videble, ŝi vendis ĉiujn; kaj trans ŝultron ŝi tenas sakon kun lignaj splitoj. Ŝi kolektis, verŝajne, ie sur konstruejo, iras hejmen. Kaj videble, la sako lacigis ŝian ŝultron, ŝi ekvolis transmeti ĝin sur alian ŝultron; ŝi malsuprenigis la sakon, metis la korbon kun pomoj sur stratan koloneton kaj komencis enskui splitojn en sako. Kaj dum ŝi enskuis sakon, de ie aperis knabo, elkaptis pomon el korbo kaj volis forkuri, sed la maljunulino rimarkis, sin returnis kaj ekkaptis la bubon je maniko. La bubo ekbatiĝis, volis forŝiriĝi, sed la maljunulino ekkaptis lin per ambaŭ manoj, forbatis de li ĉapon kaj ekkaptis je haro. La bubo krias, la maljunulino insultas. Avdeič ĵetis sian laboron planken, elkuris tra la pordo, eĉ faletis sur la ŝtuparo kaj faligis la okulvitrojn. Avdeič elkuris sur la straton; ĉi, la maljunulino skuas la bubon je haroj kaj insultas, volas konduki lin al policano; la bubo penas liberiĝi kaj ŝi sin pravigas.

“Mi,” li diras, “ne prenis; pro kio vi batas; forlasu.” Avdeič komencis disigi ilin; prenis la bubon je mano kaj diras:

“Forlasu lin, avineto, pardonu lin pro Kristo.”

“Mi tiel pardonos lin, ke li memoros tutan jaron. Mi forkondukos lin, sentaŭgulon, policejon.”

Avdeič komencis admoni la maljunulinon:

“Forlasu,” li diras, “avineto, li ne faros ĝin plu. Forlasu pro Kristo.”

La maljunulino forlasis lin; la knabo volis kuri, sed Avdeič ektenis lin.

“Petu,” li diras, “pardonon ĉe la avineto. Kaj plu ne faru; mi vidis, kiel vi prenis.”

La knabo ekloris, komencis peti pardonon.

“Nu jen tiel! Kaj nun prenu pomon, jen.”

Kaj Avdeič prenis el la korbo pomon kaj

donis al la knabo.

“Mi pagos, avineto,” li diris al la maljunulino.

“Vi trodorlotas tiamaniere ilin, malnoblulojn,” diris la maljunulino. “Necesus tiel lin rekompenci, ke li ne povu tutan semajnon sidiĝi sur sian postafjon.”

“He, avineto, avineto,” diris Avdeič. “Laŭ ni estas tiel, sed laŭ Dio estas ne tiel. Se necesas vergi lin pro pomo, kion necesas fari al ni pro niaj pekoj?”

La maljunulino eksilentis.

Kaj Avdeič rakontis al la maljunulino parabolon pri tio, kiel mastro pardonis al farmulo tutan lian grandan ŝuldon; kaj la farmulo ekiris kaj komencis premeĝi sian ŝuldanton. La maljunulino aŭskultis, la knabo ankaŭ aŭskultis.

“Dio ordonis pardoni,” diris Avdeič, “alie al ni ankaŭ ne pardonigo. Ĉiujn pardoni, kaj nekomprentantan despli.”

La maljunulino balancis kapon kaj ekspiris.

“Nu, certe, tiel,” diris la maljunulino, “sed ili ja trodorlotiĝis.”

“Tiele, ni, maljunuloj, devas instrui ilin,” diris Avdeič.

Tion mi ankaŭ parolas,” diris la maljunulino. Mi mem havis sep infanojn, sola filino restis.”

Kaj la maljunulino komencis rakonti, kie kaj kiel ŝi vivas ĉe la filino kaj kiom da nepoj ŝi havas.

“Jen,” ŝi diras, “kia jam estas mia forto, kaj mi laboras. Mi kompatas infanojn nepojn; kaj bonaj, estas la genepoj: neniurenkontas min, kiel ili. Ksenjo deiras de mi al neni. „Avineto, kara avineto, karulino”... Kaj la maljunulino tute malseveriĝis. “Ceterere, infana agado. Dio kun li!” diris la maljunulino rilate al la knabo.

Apenaŭ la maljunulino volis levi la sakon sur la ŝultrojn, alsaltis la knabo kaj : diras:

“Permesu, mi portos, avineto, mia vojo estas la sama.”

La maljunulino balancis la kapon, kaj surmetis la sakon sur la knabon.

Kaj ili ekiris kune laŭ la strato. Kaj la maljunulino forgesis demandi de Avdeiĉ monon por la pomo. Avdeiĉ staris kaj ĉiam rigardis ilin kaj aŭskultis, kiel ili iris kaj ĉiam interparolis pri io.

Avdeiĉ revenis hejmen, trovis la okulvitrojn sur la ŝtuparo, ili ne rompiĝis; li prenis sian laboron kaj sidigis denove. Li laboris iom kaj vidas: lanternisto venis lumigi lanternojn. „Videble, necesas, lumigi lampon”, li pensis, lumigis la lampon kaj denove komencis laboron. Li tute finis unu boton, rigardis: bone. Li kaŝis, ilaron, prenis la lampon, starigis ĝin sur la tablon kaj elmetis de breto Evangelion. Li volis malfermi la libron sur tiu sama loko, kie li notis hieraŭ per detranĉaĵo de marokeno, sed ĝi malfermiĝis sur alia loko. Kaj kiam Avdeiĉ malfermis Evangelion, li rememoris sian hieraŭan sonĝon. Kaj ĵus, kiam li rememoris, subite aŭdiĝis al li, kvazaŭ iu movetas, paŝetas per piedoj post li. Avdeiĉ ekrigardis reen kaj vidas: staras kvazaŭ homoj; en malluma angulo, staras homoj, sed li ne povas kompreni, kiuj estas. Kaj voĉo murmuretas al li en orelon:

“Martino! he, Martino! ĉu vi ne ekkonis Min?”

“Kiun?” elparolis Avdeiĉ.

“Min,” diris la voĉo. Ja ĝi estas Mi.”

Kaj elpaŝis el la malluma angulo Stepanoviĉ, ekridetis kaj kiel nubeto disiĝis, malaperis.

“Kaj ĝi estas Mi,” diris la voĉo.”

Kaj elpaŝis el la malluma angulo la virino kun la infaneto, kaj la virino ekridetis, la infaneto ekridis, kaj ili ankaŭ malaperis.

“Kaj ĝi estas Mi,” diris la voĉo.

Elpaŝis la maljunulino kaj la knabo kun pomo, kaj ambaŭ ili ekridetis kaj ankaŭ malaperis.

Kaj ĝoje fariĝis en la animo de Avdeiĉ; li faris krucan signon, surmetis la okulvitrojn kaj komencis legi Evangelion tie, kie ĝi malfermiĝis. Kaj supre de la paĝo li legis:

„Mi ekmalsatis, vi donis al Mi manĝi, Mi eksoifis, kaj vi trinkigis Min, Mi estis vojiranto, kaj vi akceptis Min”...

Kaj malsupre de la paĝo li legis ankoraŭ:

„Ĉar vi faris tion por unu el Miaj malpliaĝaj fratoj, vi faris por Mi” (Mat 25).

Kaj Avdeiĉ komprenis, ke la sonĝo ne trompis lin, ke vere tiun ĉi tagon lia Savinto venis al li kaj vere li akceptis Lin. ■